 inf.: GERMANA E°-JUNULARO, Postfach 101422 D-HAMBURG 1 (RFA)  
 FEJO - 4bis, rue de la Cerisaie, F-PARIS 75004

27an de julio/3an de aŭgusto 1985

11a INTERNACIA KONFERENCO de NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO (N.E.M.)  
 kaj la FORUMO de M.F.K.A.

= METZ (F-59)

Vidu specialan artikolon en ĉi-tiu n°  
 inf.: Eugène De ZILAH, 39, Rue J. Hénot, F-57070 METZ

27an de julio/2an de aŭgusto 1985

INTERNACIA ANTAŬKONGRESA FERIO-SEMAJNO  
 = OBERKIRCH (RFA) - en Nigra Arbaro, 30 km de STRASBURGO  
 Bela ripozejo, mirinda ĉirkaŭaĵo... interesa, distra kaj turisma programo!  
 Nepre ĉeestu!  
 inf.: E°-Grupo OBERKIRCH, Fuchsmattstr. 23, D-7602 OBERKIRCH (sendos ankaŭ belan, koloran prospekt.)

3a/10ajn de aŭgusto 1985

**70A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN AUGSBURGO (R.F.A.)**

UNIKA, EŬROPA OKAZAĴO JARA ANTAŬ VIA FLUGADO AL PEKIN  
 VENONTJARE!

Aliĝilo en ĉi-tiu n°)

11a/18ajn de aŭgusto 1985

INTERNACIA POSTKONGRESO  
 = KRONACH (RFA) en Nordbavario  
 Vi ne forlasu Germanion post la Aŭsburga Evento!  
 En KRONACH vi ĝuos multifacetan programon en belega, famekonata regiono!  
 inf.: Städtisches Fremdenverkehrsamt, Postfach 510, D-8640 KRONACH

22an/11an de aŭgusto 1985

KURSOJ, TEATRO, ART-LABORO, TURISMO  
 = E°-Domo "GRESILLON" (F-49)  
 inf.: (vidu supre).

## NIA VIVO EN ...

### BAR-le-DUC

Okaze de sia unua ĝenerala kunveno, la 11an de oktobro 1985, kiun ĉeestis 10 klubanoj, la loka grupo planis diversajn aktivaĵojn por la kuranta jaro; estis do sinsekve pritraktitaj la temoj pri:

- = monataj renkontiĝoj senformalaj (ĉiun unuan merkredon je la 20a30)
- = organizo de la zamenhof-tago (26an de januaro). Responsos S-in° Dillenschneider
- = akcepto de S-r° GETHER (hungaro preleganto)
- = alpublika informado
- = eventualaj E°-kursoj = partopreno al la urba karnavalo
- = abono al 3 revuoj (Heroldo, Monato, El Popola Ĉinio)

Fakte S-r° GETHER ĉeestis la urbon dum tri tagoj, gastigata de familioj GILBERT kaj DENIS. Interesa kaj vigla prelego okazis en salono de la urbdomo (32 ĉeestantoj inter kiuj 12 "profanuloj"...). Ne nur el NANCY kaj TROYES venis esperantistoj....

S-r° RICKETTS, korespondanto de S-r° Gether speciale veturis al BAR-le-DUC... el Britio! Li estis gastigata de S-r° Gilbert. Li povis do longtempe babili kun sia hungara amiko. Cetere la klubanoj organizis amikan vesperon ĉirkaŭ "bona tablo" en vilaĝa restoracio. Ankaŭ estis organizata vojaĝo al NANCY, kun vizitoj de Centre de Distribution des Eaux en Vandoeuvre, urba akvario. Kelkaj tieaj klubanoj akompanis la hungaran gaston dum tiuj vizitoj (kaj tagmanĝo!).

Konversacia rondo daŭras ĉe familio Gilbert. Publika kurso estas planita komence de la la trimestro 1985.

Ĝis nun 5 personoj aliĝis al la Universala Kongreso de AUGSBURG kaj 3 al la INTERNACIA TURISMA SEMAJNO en NICE.

\*\*\*\*\*

### BRUYERES

Du kursoj funkcias ek de septembro. La unuagrada konsistas el 13 junulinoj kaj la dua-grada el 4 geliceanoj.

Kiel lastjare la grupo partoprenos en la Internacia Karnavalo en Bar-le-Duc.

(laŭ informoj de S-r° Claudel)

\*\*\*\*\*

### MUNSTER

Kolegio: kvin gelernantoj sekvas ĉi-jare la elementan E°-kurson. Jam post kelkaj semajnoj ili komencis korespondi kun eksterlandanoj dank' al KORESPONDA SERVO MONDSKALA.\*

Por la kursoj de la lernojaro 85/86 jam reklamis en la sesa klaso la dek-unu-jara Daniel BUSSE, dum preskaŭ unuhora prezento de esperanto kadre de la kurso pri la franca lingvo. Ne nur la gelernantoj estis mirigitaj, ankaŭ lia profesoro, kiu rekompencis lin per merititaj 20 poentoj!

Liceo: pro malfavora horaro, regula kurso ne eblas ĉi-jare, sed plukunvenas de tempo al tempo la eksgelernantoj de la kolegio. Inter la gazetoj de la dokumentujo daŭre estas troveblaj esperanto-revuoj.

Edmond LUDWIG

\*\*\*\*\*

### MULHOUSE

Dank' al la klopodoj de S-in° CHARTON funkcias nun, ĉe UNIVERSITE POPULAIRE en Mulhouse, E°-kurso por komencantoj. Ĝi komenciĝis la 8an de oktobro kaj okazas ĉiun lunde de la 18a30 ĝis la 20a horo. Aliĝis al la kurso naŭ gelernantoj. La aliĝkotizo estas 390F po-jare same kiel por ĉiuj aliaj lingvo-kursoj. Gvidas la kurson A. GROSSMANN per "Metodo 11" kaj poste per "Metodo 12".

Loka Radio-stacio "Radio-Visage" (101,6 MHz) disaŭdigas elsendon pri E°, ĉiun mardon de la 19a ĝis la 20a30. S-in° Charton prizorgas la elsendon kaj donas informojn pri E° aŭskultigas E°-kantojn kaj eble baldaŭ E°-kurson.

André GROSSMANN

\*\*\*\*\*

NANCY

La nova laborjaro rekomenciĝis per kunveno en MJC Desforges, la 28an de septembro. Partoprenis 12 personoj.

Ni provis anonci 2 kursojn por komencantoj per komunikoj al la radio kaj al la 2 lokaj gazetoj (sed nur 1 gazeto aperigis...). Mi-mem disgluis 30 afiŝojn kaj disdonis 650 flugfoliojn, el kiuj 150 "M4".

rezultis kurso, marde je la 18a30 kun 2 gelernantoj (gvidas C. ROUX). Merkrede nur unu persono aliĝis... sed eĉ ne venis... do tiu kurso ne povis funkcii!

kontentige estas ke pli ol 10 personoj interesiĝis pri dua-grada kurso. Funkcias 2 kursoj por tiu grado: la unua la 2an kaj 4ajn mardojn de ĉiu monato je la 18a30 kun 4 personoj (gvidanto, R. DEGRELLE), studas la verkon "El la maniko". La 2a okazas ĉiumerkrede je la 20a30, 7 personoj studas "M12", gvidataj de J.P. COLNOT.

La kunvenoj okazas principe unufoje monate, la 2an vendredon je la 20a30. La 9an de novembro, prepare al la staĝo, kunvenis 9 personoj. La decembra kunveno okazis la vendredon 14an je la 20a30, honore al Dr° Zamenhof kaj al la Homaj Rajtoj.

= Radio-elsendoj. Pro la neebleco starigi teamon por animi la elsendojn proponitajn de la loka elsendejo "Graffiti", ni rezignis por la nuna jaro.

= Uzado de "Metodo 4". Disdoniĝis do 150 dum nia aŭtuna kampanjo. Nur 4 personoj respondis -kaj nur 2 el ili sendis la petitajn poŝtmarkojn!- ni scias nenion pri iu ajn rezulto pozitiva. Tiu disdonado donis al ni la eblecon provi la disdonilojn proponitajn de UFE: ili estas tre taŭgaj por prezenti al la publiko flugfoliojn pri E° en ejo, kie oni kutime ne povas deponi ilin. Ni uzis ilin kaj por M4 kaj por aliaj prospektoj, en diversaj fakultatoj, liceo, turisma oficejo, junuldomo... Tamen ĝenerale la rezulto lamas: la homoj prenas flugfoliojn... nenio sekvas!

= Prezento de "M3" en klasoj "Cours Moyen 2ème année. Mi provis dum marto prezenti E°n per tiu metodo en la finklasoj de elementaj lernejoj de LAXOU. Sed la direktoroj postulis permeson de la Akademia Inspektoro. Mi do skribis por peti tiun permeson. La Inspektoro respondis la 9an de aprilo, demandante kion mi planas prezenti. Mi respondis sendante ekzempleron de "M3" kaj petante permeson por 8 lernejoj en LAXOU kaj NANCY. Mi ricevis la 12an de majo la jenan respondon:

*"Vous avez sollicité l'autorisation de présenter la langue internationale espéranto à des élèves des écoles élémentaires de Laxou et Nancy. Il ne semble pas que ceux-ci puissent utilement s'attacher à cette information car ils ne se montrent intéressés que par la langue vivante qu'ils seront appelés à apprendre à leur entrée en 6ème au collège".*

Mi transdonis tiun respondon al renée TRIOLLE, kiu, kiel ĝenerala sekretariino de UFE, skribis siavice al la Inspektoro. neniu respondo. Konkludo: nur instruistoj povas uzi M3, la aliaj personoj frontas rifuzon kaj de la Inspektoro...

J.P. COLNOT

PERKORESPOŬDA KURSO

El la lernojaro 1982/83, 8a lernantino preskaŭ atingis la kursfinon: F-in° Marie-Paule FORTENBACH (Villers-lès-Nancy), gvidita de Catherine ROUX (Vandoeuvre).

El la lernojaro 83/84, nur 3 personoj ĝis nun atingis la kursfinon: F-in° Sonia BERTIN el MULHOUSE (gvidita de S-r° GROSSMANN, S-in° Odette SCHEIDEL (67660 BETSCHDORF) gvidita de S-r° WICK (Strasbourg) en malpli ol 3 monatoj. S-in° Alice HESSEL (METZ) gvidita de S-r° VIVIER (Joeuf).

Por la nuna lernojaro ni "funkcias" nun per "METODO 11" (kaj poste per "M12"). Mi dissendis al la regionaj gazetoj entute 22 komunikojn ĝis nun. La rezultoj ne estas entuziasmigaj: almenaŭ 18 komunikoj aperis; 38 personoj petis informojn sed nur 6 aliĝis al la kurso. Ĉu eble la kotizo estas tro alta? (Nun 138F plus eventuala kasedo 45F, do entute 183F). Tamen la nuna funkciada parto de la kotizo (42F por la kurso mem) ne ebligas kontentige funkcii, se oni varbas malpli ol 30 gelernantojn, despli ke preskaŭ duono de la informpetantoj ne aldonas afrankon por respondo. Ĝis la fino de novembro do: 6 aliĝintoj. Je la sama dato, jam 11 aliĝintoj en 1983 kaj 13 en 1982... Nova serio da komunikoj estos dissendata frue en decembro kaj aliaj sekvos komence de januaro kaj februaro.

J.P. COLNOT

\*\*\*\*\*

EPINAL

Dank' al iniciato de Manette BERNARDIN ĉe la "Naturamikoj" en EPINAL funkcias ekde aprilo 1983 neformala rondo por paroli en esperanto: dekunu personoj el GOLBEY, EPINAL, LE THOLY, GERARDMER, REMIREMONT, FRESSE, precipe naturamikoj aŭ anoj de la t.n. "Moderna Lernejo" (pedagogiaj teknikoj de Célestin FREINET) neregule sed laŭeble kunvenas jen ĉe iu, jen ĉe alia.

La lernantoj laboras per diversaj kurso-metodoj: "Junulkurso", "Por la Praktikan-  
toj", "Ni parolu en Esperanto" kaj per rekta metodo; do ili maldetale dispartiĝas laŭ  
du niveloj. Laŭ letero de S-r° Colnot la rondo invitis dudek personojn al informkun-  
veno, kiu okazis sabaton dekokan de februaro. bedaŭrinde venis nur du personoj kaj nur  
unu aliĝis al la rondo. Sed ĝis nun neniu ĝin forlasis.

Aliĝos al Asocio(j) la partoprenantoj pli malfrue, kiam ili deziros.

(laŭ intervjuo ĉe radio en GERARDMER)

\*\*\*\*\*



BIBLIOTEKO-JUVELO!

De tempo al tempo ĉiu esperantisto ŝatas plezuri al si per aĉeto de bela verko, kies  
enhavo plej valoras kaj kies belaspekto ĝuigas okulojn... kaj haŭto palpemajn fin-  
grojn. Jen do nepre havinda re-eldonaĵo: "*ESPERANTO-ANTOLOGIO*", ege kompetente kompi-  
lita, redaktita kaj ĝisdatigita de William AULD. Tuta panoramo de nia propra litera-  
turo poezia ĝis la jaro 1981! - 162,00 FF

JEN KELKAJ PLIAJ NOVAĴOJ ...

*LA MORTSONORILO DE CHAMBLAY* (Karolo PICĈ) - detektivromano

*APENAŬ BUKEDETO* (Roger BERNARD) - poemaj tradukitaj el la franca lingvo

*LA SUFEROJ DE LA JUNA WERTHER* (GOETHE) - traduko de Reinhard HAUPENTHAL

*ELPAFU LA SAGON!* (Tibor SEKEJL) - buŝa poezio de l' mondo

*EL PARNASO DE POPOLOJ* (GRABOWSKI) - poemoj originalaj kaj tradukitaj

*MAX KAJ MORITZ* (Wilhelm BUSCH) - buba rakonto en sep petoloj, tradukita de F. DÖRING

*PARNASA GVIDLIBRO* - 3a eldono - (KALOCSAY, WARINGHIEN, BERNARD) - kompletigita de  
"la manlibro de la poetiko"

*OMBRO SUR INTERNA PEJZAĜO* (Spomenka STIMEC) - romano originale verkita en E°

*KIUJ SEMAS PLORANTE...* (Eva TOFALVI kaj Oldrich KNICHAL) - la unua romano premiita  
de l' premio Raymond SCHWARTZ

*ĈU VI KONAS LA TERON* (Endre DUDICH) - scienca libro ege alloga...

Tiujn librojn vi mendu rekte al nia libro-servo per simpla poŝt-karto  
(kun via adreso kompreneble!). La fakturon vi malkovros en la pakajo.

LIBRO-SERVO M.J.C. BP 23 - 54510 TOMBLAINE

P.Ĝ.K° (Poŝt-Ĝir-Konto) 2800-76 H - NANCY

NEKROLOGO

SinJORINO Elisabeth HEITZ, patrino de SinJORINO DE ZILAH, forpasis la 1an de oktobro 1984.  
Ŝi siatempe partoprenis unu el niaj staĝoj. Al Madeleine DE ZILAH, al Eugène DE ZILAH kaj  
al Edgar, ĉiuj tri aktivaj esperantistoj, ni sincere kondolencas.



Oni ĉiam konsideris tiun departementon kiel rezervujon de laboristaro, ĉar la industriistoj rifuzas establi tie siajn uzinojn. Starigitaj en la najbaraj departementoj "Meurthe-&-Moselle" kaj "Moselle", la uzinoj bezonas laboristojn. Norde de VERDUN ekzistas nur du uzinoj, relative malgrandaj, en STENAY; en la unua, oni prilaboras la ŝtalon, en la dua la paperon; ĉiu el ambaŭ okupas 200 laboristojn.

Tamen ekzistis gravaj komunik-eblecoj, sen malfacilaĵoj, dank' al la nivelo-diferencoj: la rivero "MEUSE" kun flankaj kanaloj, kaj la ŝoseo kaj la fervojo paralelaj al la rivero (linio de SEDAN ĝis LEROUVILLE). La fervojo estas nun preskaŭ forlasita; la barĝoj -kiuj estas nur malmulte ŝarĝitaj- fariĝis maloftaj. Lasta-tempe oni renovigis la vojon. La malgranda industrio plu-daŭras malfacile; sude de VERDUN la entreprenoj estas maloftaj. En Verdun oni trovas malgrandajn laborejojn pri marokenaĵoj kaj tolaĵoj.

Je kelkaj kilometroj okcidente, troviĝas "LACTO-FRANCE", kiu kemie traktas la serumon el la fromaĝejoj kaj tiel evitas la poluadon de la riveroj. "INTERNATIONAL-CHEMICAL-INDUSTRIE" instalas sin en Baley Court sur la loko de iama distilejo, kaj uzinoj pri transformado de ŝtalo troviĝas en ANCERVILLE (apud la fandejoj de SAINT-DIZIER), REVIGNY kaj ETAIN. Oni fabrikas metalajn meblojn en "Les Islettes", kaj "laŭ-stilajn" meblojn en Dombasles-en-Argonne, Sommedieue, Bar-le-Duc, Commercy, Ligny-en-Barrois. En tiu lasta urbeto troviĝas fabriko de optikaj instrumentoj "ESSILOR". Etain posedis uzinon, kie oni fabrikis pupojn kaj kaskojn el plasto, kaj SAINT-MIHIEL havas fabrikon de farmaciaj produktaĵoj.

En la regiono de EUVILLE, LEROUVILLE, SAVONNIERES kaj VOID oni ekspluatas belajn minejojn de ŝtonoj por skulptado. Oni uzas tiujn ŝtonojn por konstrui oficialajn monumentojn.

En la galerioj de la iamaj minejoj de SAVONNIERES oni kultivas fungojn.

La fero-minejoj de Baroncourt kaj BOULIGNY konstituas parton de la "Baseno de BRIEY". En Verdun kaj Haudainville plu-ekzistas du kalko-fornoj sed la ekonomika krizo en la fero-industrio ĉesigis la funkciadon de tiaj fornoj en Pagny-sur-Meuse.

BAR-le-DUC estas fiera pri iu aparta fabriko: fakte oni faras tie konfitaĵon per senkernigitaj riboj\*. Tiu entrepreno estas konata eĉ en Usono!

En COMMERCY oni bakas la famajn kuketojn "Madeleine" kaj en VERDUN oni fabrikas bongustajn draĝeojn \*\*.

**B**redado estas la ĉefa aktiveco tie. Oni bredas en tiu departemento multajn bovinojn: 27 laktejoj/fromaĝejoj estas instalitaj... Inter ili troviĝas la bone konata firmao "BEL".

La ekspluatado de la forstoj estas la dua granda ekonomika afero en "MEUSE". Antaŭ la jaro 1950, oni ne -aŭ nur malmulte- dehakis la arbojn. Dum la unua mondmilito la plej belaj arboj estis hakitaj nur en la forstoj facile alireblaj. En la montetoj kun tero argila aŭ marĉa la malfacilaĵoj estis tro grandaj; krome certaj arboj entenis ĝenajn splitojn de ... mitrajlo!

La instalado de la franca societo "La Cellulose du Bois" (La Celulozo de la Ligno) en Belgio proksime de la land-limo, la modernaj laboriloj kun motoroj kaj la ampleksaj transportiloj ebligis rentablan ekspluatadon de tiu belega forsto.

Turismo disvolviĝis ĉi-tie same kiel en tuta Francio. Iu formo de turismo ekzistas jam ekde la jaro 1920: "La Meuse" estas departemento de militaj tombejoj: multaj homoj pilgrimas al la lokoj, kie okazis la bataloj dum la jaroj 1916-18. Multe-nombraj eks-batalantoj revenas -grupe aŭ unuope- por ree vidi la ruinigitajn batal-terenojn. La dato-revenoj estas solene celebrataj. Venas ankaŭ multaj grupoj da gejunuloj, lernejanoj, armeanoj francaj aŭ alia-landaj. La lokoj estas aranĝitaj por ebligi la parkadon de la aŭto-veturiloj; la interno de la fortikaĵoj estas elektre lumigitaj. Oni konstruis monumenton memore al la dum-militaj mortintoj sur la loko de la vilaĝo FLEURY; novaj turismaj prospektoj ricevis instruon. La tombejoj estas multnombraj; la plej gravaj troviĝas en DOUAUMONT -kun ties grandega "ostejo"-, en ROMAGNE kaj en le "Mont-Sec" por la Usonanoj.

**A**rkitekturo: La departemento posedas kelkajn interesajn monumentojn. en AVIOTH: la baziliko laŭ-stile gotika kaj ĝia "Lanterno de la Mortintoj" nomita "La Recevresse", unika en Eŭropo.

En MARVILLE: rimarkinda preĝejo el la XVIa jarcento; tombaj ŝtonoj bele skulptitaj el la XVa kaj XVIa jarcentoj; postrestaĵoj de la hispana okupado kaj postrestaĵoj laŭ stilo Renesanco.

.../...

En Juvigny (apud MONTMEDY): renesanca kastelo kun 360 fenestroj.

En VERDUN: belega katedralo el la XIa kaj XIIIa jarcentoj; preĝejo Sankta-Mihiel; pluraj tipaj domoj kun skulptaĵoj fare de LIGIER RICHIER.

En COMMERCY: la kastelo Stanislao.

En BAR-le-DUC: en la malnova (alta) urbo, multe da fasadoj skulptitaj dum la renesanca epoko; la preĝejo Sankta-Petro kun la "skeleto", aparta skulptaĵo fare de Ligier Richier; en la proksima kvartalo: tre malnova lernejo -"Collège Gilles de TREVES", kiu estas inda esti konservata.

Inter la fame konataj homoj, kiuj naskiĝis en tiu departemento, oni povas citi: la jam menciitan skulptiston Ligier-Richier (1500/1567), la inĝenieron Joseph CUGNOT (1725/1804), kiu realigis la unuan per-vaporan veturilon, la Imperio-epokan "marŝalojn" OUDI-NOT kaj EXELMANS kaj la fratoj MICHAUX kiuj, en 1842 inventis kaj perfektigis la biciklon.

Tiu "verda departemento" estas tre ŝatata pro pluraj kialoj:

-ĝi ne suferas pro poluado el industrioj ;

-ĝi posedas multnombrajn naturajn lagetojn kaj speciale estigitajn lagojn;

-la rivero "MEUSE" estas riĉa je fiŝoj;

- la kampadejoj estas multnombraj...

-multaj domoj estas aranĝataj en la vilaĝoj fare de homoj el la najbaraj landoj, nome Belgioj, Luksemburganoj, Germanoj... kaj ankaŭ fare de Parizanoj.

La "Regiona Parko de Lorraine", kiu entutigas teritoriojn oriente de ST-MIHIEL, en la departementoj Mthe-&-Mlle kaj Moselle alportas ian aktivecon al tiuj regionoj.

Inter la vilaĝoj Nonsart kaj Montsec, ĉe la fonto de "Rupt-de-Mad", oni estigis ampleksan lagon, kiu havigos puran akvon al la urbo METZ, kiu riskis baldaŭ suferi pro manko. Tiu laboraĵo ne ankoraŭ estas finita sed la "komplekso" por sportoj jam funkcias (velado-lernejo, navigado, sur-akva-pedalado, tendumado, fiŝo-kaptado per senmotoraj boatoj).

La junaj kultivistoj kaptis la okazon por pligrandigi siajn enspezojn. Ili kreis prosperajn frukto-ĝardenojn: la "Mirabelo el Lorraine" jam gajnis kvar or-medajlojn en Parizo. Kelkaj el inter ili provas replanti vitojn, kiuj iam kreskis tie -"Vin des Côtes-de-Meuse" t.e. "Vino de l' Montetoj". Krome ili kultivas pli da legomoj kaj klopodas revivigi la "metiojn".

En VIGNEULLES oni praktikas la rajdo-arton; la grupo de rajdemuloj estas atentinda.

La urbo MONTMEDY allogas pli ol 20 000 personojn ĉiujare por viziti la citadelon; la arboj, kiuj kaŝis ĉi-tiun, malaperis. Taŭga vojeto estis aranĝata; la muroj nun estas markitaj per utilaj sagoj; kvar aŭtomatoj kun magnetaj sonbendoj rakontas resumon pri la historio de la fortreso.

Dum la Pasko-festo 1977 Eŭropa manifestacio allogis 200 "rajdistojn" francajn kaj ali-landajn!

Ne multe da turistoj veturas sur la "aŭtostrado" A4... ili opinias ja, ke la vojo-im/posto estas tro kosta!

Apud la alirejo al la aŭtoŝoseo, flanke de la urbo Verdun, estas instalita "Maison de la Meuse" -Domo de Meuse-, en la sama konstruaĵo, kie estas hostelo/restoracio, por konigi la produktojn kaj ankaŭ la interesajn lokojn de tiu "verda departemento".

\* vidu LA INFORMILO-n n°47


\*\* specifa artikolo en nia venonta n°

kompilis kaj tradukis

Jean DEMISSY kaj Yvette BRION

\*\*\* plus rapide... plus efficace ...

**NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO**  
PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

C'EST LE COURS "QUATRE ÉTOILES"!

Tous renseignements à l'adresse suivante: COURS D'ESPERANTO  
PAR CORRESPONDANCE

## nos cotisations 1985

Vous venez de recevoir le n° 48 de "LA INFORMILO", dernier de votre abonnement 1984. Afin de recevoir toute la série de l'an prochain, nous vous invitons à vous acquitter de vos cotisations dès maintenant, cette procédure facilitant grandement notre travail tout en vous assurant un service ininterrompu de votre bulletin. Vous trouverez ci-dessous le nouveau tableau des cotisations pour 1985.

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

### COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à l'UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, par contre, l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après.
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:  
 = de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO  
 CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)  
 = par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (15F), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

### CAT. TABLEAU DES COTISATIONS 1985

- 1 = abonnement simple à LA INFORMILO  
 2 = adhésion simple à la FEDERAT. CULT. DE L'EST  
 \* *membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)*  
 \* *membre fédéral (sans " ... pour les autres membres de la famille par exemple)*
- 3 = adhésion à la FEDERATION et à l'U.F.E.  
 \* *membre simple*  
 \* *membre abonné "junior" (avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO")*  
 \* *membre abonné "senior" (avec la revue de l'UFE)*  
 \* *membre abonné (conjoint)*
- 4 = adhésion à la FEDERATION + U.F.E. + U.E.A.  
 \* *membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + la revue "KONTAKTO"... si moins de 26 ans)*  
 \* *membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + revue mondiale "ESPERANTO" + revue KONTAKTO si moins de 26 ans)*

moins de 22 ans	plus de 22 ans
25F	25F
18F + 25F	18F + 25F
18F	18F
65F + 25F	65F + 25F
155F + 25F	170F + 25F
	80F
231F + 25F	246F + 25F
345F + 25F	246F + 25F
	360F + 25F
	360F + 25F

### IMPORTANT

- A - Tous les membres reçoivent la carte fédérale (s'ils sont nouveaux adhérents) et la revue trimestrielle régionale LA INFORMILO (... s'ils sont abonnés)
- B - Les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de ces associations (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1985 donnant droit au service des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C - Les membres de l'Enseignement sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (G.E.E.)... sauf catégorie 2.
- D - Les jeunes gens jusqu'à 25 ans voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANC. (J.F.E.O.) sauf catégorie 2. Ils recevront alors en plus la revue "KONCIZE" et le bulletin interne national "JEFO informas".

## FAITES VIVRE VOTRE PRESSE... **abonnez-vous !**

Toutes ces revues sont entièrement rédigées en E°. Celles dont le titre est précédé d'une croix sont à régler directement à U.E.E. 4bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855-35 PARIS. Les autres pourront être réglées à notre trésorier qui transmettra.

(chèque au libellé de la Fédération, envoyé à A. GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM F) Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto - CCP 1997-72 V NANCY

+ ESPERANTO	revue offic. de UEA	abonnement simple	mensuel	114 F
+ KONTAKTO	revue pour adolescents et jeunes gens		4 n°s	57
KONCIZE	bulletin européen pour jeunes gens		6 n°s	30
KULTURAJ KAJEROJ	revue culturelle		6 n°s	60
+ HEROLDO DE ESPERANTO	revue d'inform. format journal		18 n°s	90
+ HOMO KAJ KOSMO	revue de vulgarisat. scientif.		4 n°s	28
+ LITERATURA FOIRO	revue littéraire		4 n°s	80
+ MONATO	magazine international		11 n°s	145
+ JUNA AMIKO	style simple - parfait pour débutants		3 n°s	20
+ OVO	internacia gazeto por distro kaj amuzo		15 n°s	100
HORIZONTO	revue du "mouvement neutre" E°		6 n°s	100
LA MIGRANTO	bulletin des "amis de la nature"		4 n°s	30
+ SCIENCA MONDO				30
+ INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO				50
+ EUROPA DOKUMENTARO				90

*Les revues ci-dessus peuvent être considérées comme neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.*

*Celles qui suivent sont généralement qualifiées "d'engagées"*

+ BIBLIA REVUO				60
+ OOMOTO	revue japonaise (philos. relig.)		6 n°s	42
ESPERO KATOLIKA				75
FRANCA KATOLIKA	ESPERANTISTO			30
+ DIA REGNO	internationale (protestante)			67
SAT-AMIKARO	bulletin mens. des trav. et syndic. franç.			100
SENNACIULO	même tendance mais international		12 n°s	140
+ EL POPOLA ĈINIO	de Chine Populaire - en couleurs		1 an 12 n°s	60
			2 ans 24 n°s	100
			3 ans 36 n°s	144
+ LA KANCERKLINIKO	d'avant-garde, politique et culturel		4 n°s	55



Vous pouvez également vous procurer des vignettes gommées (4x3cm) de couleur verte. Chaque feuillet comprend 9 vignettes de textes différents: 2 feuillets 3,50F + 1,60F d'affranch. si non accompagné d'une autre commande. 10 feuillets 17F (franco). 25 feuillets 40F (franco)

Ont également un grand succès des CARTES DE VISITE qui présentent succinctement l'Espéranto. On y trouve l'adresse de UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi: 8 cartes 6F; 20 cartes 12F.

Figure aussi sur notre catalogue le "Lexique" bien connu de F. LEGER (Espéranto-Français). 1 ex. 10F. (franco) -

"FACILAJ DIALOGOJ" par A. Lienhardt. 12 dialogues vivants en E° et en français, pour apprendre rapidement à parler la Langue Internationale. Nombreuses questions et réponses didactiques complémentaires. Casette d'accompagnement avec enregistrement des textes en E°:

Le livret seul 29F (franco) - La cassette 33F.

"ESPERANTO, une approche de la Langue Internationale": petite brochure de 60 pages, éditée par l'U.F.E.: 10 F (franco)

NOTE: Ces prix pourront être éventuellement réajustés en fonction d'une variation des tarifs postaux.



100 histoires drôles et 2000 questions/réponses, qui permettent aux débutants d'apprendre facilement à parler l'espéranto. (voir notre numéro précédent). - prix franco: 49F

Les 3 cassettes d'accompagnement sont désormais disponibles. Elles contiennent l'enregistrement de la préface et des 100 anecdotes.

Prix franco pour 1 cassette: 33F, pour 2 (dans une même commande): 60F, pour 3 cassettes: 90F

Si vous ne commandez que la 2ème ou la 3ème cassette, il y a lieu de mentionner par quelle "histoire" celle-ci doit commencer.

Veuillez passer vos commandes à A. GROSSMANN,  
5, Rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM. CCP 819 34 STRASBOURG

# NIAJ LEGANTOJ VERKAS...



## Festivitès du Grand Pardon

Chaumont  
23 et 24 juin 84

En CHAUMONT (52-"Haute-Marne") okazas la "GRANDA PARDONO". Oni solenas ĝin ĉiujfoje kiam la 24<sup>a</sup> de junio (Sankta Johano) okazas dimanĉe. Tion oni konstatas ĉiukvin-6- aŭ 11jare. Tiu kutimo datiĝas de 1475, kiam Johano de Montmirel, naskiĝinta en CHAUMONT, estis laboranta apud la Papo Sixte IV. Li petis de li, ke ĉiuj katolikanoj, kiuj pentos pri siaj pekoj, krimoj, ekscesoj, kulpoj kaj vizitos la kanonikan domon tiun tagon, ricevos kompatan indulgon.

La GRANDA PARDONO estas esence religia kun alveno de ekleziaj altranguloj, kiuj celebras Pontifikan Meson sub libera ĉielo, sed ankaŭ popola festo estas inkluziva kun prezentadoj de "mirakloj", fajro-elĵetuloj, urso-dresistoj, dancoj kaj muzikantaroj.

Dum dimanĉ-vespero oni prezentis spektaklon, kiu rakontas la vivon de Sankta-Johano-Baptisto, la sanktulo de la Baziliko. Antaŭ 1962 "ripoz-altaroj" ilustris la diversajn stadiojn de ties vivo; nun en montrofenestroj, grandaj pentraĵoj anstataŭigas ilin.

Floraj girlandoj, kronoj el papero, dekoracias la stratojn de la urbo-centro (rozoj, arumoj, papavoj, gli- cioneoj, ktp...). Tiun-ĉi jaron gladioloj estas punktitaj en grandegaj belegaj korboj, kiuj ornamas ĉefajn placojn: urbodomaj kaj bazilikaj ŝtuparoj. Verdaĵo alvenas de la arbaro per plenaj ŝarĝveturiloj. Per tabuloj la urbaj laboristoj konstruis pordegojn starantajn tie, kie estis antaŭlonge tiuj de la remparoj. Tiuj pordegos estas ankaŭ ornamitaj per verdaĵo kaj floroj.

tradukis Chaumont-a esperantista skipo!

\*\*\*\*\*

Ĝen donaco  
De Alzaco  
Al Esperantistoj,  
Muzikistoj,  
Sen registoj  
Eklaboru tiuj!

Ĉojan Kristnaskan

B. Dumis

Jus aperis nova stel'  
Verda kiel la espero,  
Kaj ĝi brilas en ĉiel'  
Plenigita de mistero.  
Ĝi al ni sciigas, ke  
Jus naskiĝis en Jude'  
Unu dia infaneto  
Por la homa reaĉeto.

Ne plu restu en malĝoj'  
Inter la malbonaj agoj,  
Ĉar ekzistas unu voj':  
Sekvu ĝin, ho reĝaj magoj.  
Malsaĝuloj mokas vin:  
«Kien do ĉi tiuj iras?»  
Sed vi trovos en la fin',  
Tiun, kiun vi deziras.

Ne malhelpos la dezert',  
Ne malhelpos malproksimo:  
Vin fortigos dia cert',  
Forigante vin el timo.  
Post jarcentoj de mallum'  
Stelo brilas tra la brum'.  
Ĝi kondukas al Jesuo  
Nia sola kora ĝuo.


La amuzaj siluetoj  
De la ĉarmaj infanetoj  
Kuras al la krip':  
Por akcepti nian savon  
Oni nure fosis kavon  
En malgranda ŝtip'.

La azeno kaj la bovo  
Lin varmigas per la blovo:  
Bestoj estas pli  
Kompatemaj ol la homoj,  
Vin ĉasintaj el la domoj,  
Ho vivanta Di'.

Sed kun via puranimo  
Proksimiĝu do sen timo,  
Infaneta flor'.  
Ĉar vi estas sen riproĉo,  
Kantu per sanktega voĉo  
Pri la dia glori'.


Sonoriloj ĉie ĝojas,  
Klingeling'!  
Al preĝejoj ĉiuj vojas.  
Klingeling'!  
Kompatindaj filoj de Adam',  
En Kristnaska tago ni forgesu  
Eĉ senteton pri malam' :-  
Dio granda ĝin al ni permesu.  
Diras ni  
Per grandega kri':  
For la limoj!  
For la krimoj!  
Unuigu la animoj!

Sonoriloj ĉie ĝojas,  
Klingeling'!  
Al preĝejoj ĉiuj vojas.  
Klingeling'!  
En la granda gajo sur la ter'  
La naturo nun al ni kunigas.  
Ĉio plenas de esper',  
Ke la homa koro mem vertiĝas.  
Diras ni  
Per grandega kri':  
Steloj, steloj,  
Diaj beloj,  
Brilu nun en la ĉieloj.





# distra angelo



## KRUCVORTENIGMO

### HORIZONTALE

1 Ĝi ludas per la nombroj. 2 Ne tiamaniere - kiu ĝuas feliĉon - fari truon (R). 3 oni nun aĉetas multe da - iama granda mambesto (R). 4 Infano - afrika neparhufulo. 5 Nek stara, nek kuŝa - efektiva rezulto - konvencia sistemo (R). 6 Alka/loido (R) - neforigebla desegnaĵo (R) - eble la rezulto. 7 Prepozicio - itala regiono (R) - ĝi kreskas sur senkultura regiono (R). 8 Embrio - forlasi (R) - de la pordego ĝis la horejo. 9 Birdo - impresi ian senon (R) - sufikso. 10 Mal/vigleco de organo (R) - branĉo de celenteruloj (R). 11 De antikva muzikinstrumento - mara herbo - fino de verbo. 12 Metaloido - prepozicio - filo.

VERTIKALE = 1 Astero - Romo estis kolonio de tiu urbo (R). 2 Paroli pri io - preferi el pluraj. 3 germana li/rikaĵo - nutromaniero - metalo. 4 Ĝi kreskas sur la muroj (R) - plibeligi (R). 5 Forgeskelo (R) - kontroli. 6 Buŝforma floro - strio aŭ ĉirkaŭtrunka ligilo (R). 7 Por nutri bebon - malofta metalo - malmola korp parto (R). 8 Sufikso - la koro de la paco - prepari varme nutraĵon - donace al la edziniĝinto. 9 Delikata ledo - en terciara epoko - metalo (R). 10 Felta mantelo (R) - malĝusta faro (R) - sin moviĝi. 11 Enskribo - frukto (R) - muzika verko. 12 Plurjara herbo - horo.

\*\*\*\*\*


**SILABENIGMO** = *Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La unua kaj dekstra kolonoj, vertikale legataj, formas proverbon.*

ado an ba cep ĉa da da dro ef em era is it ka kle klo lo lo mo na ni no on op os po psi  
rio ro si sis so ti tim to tri u umo ŭd zo

1	+ - + - - - - -	akvohorloĝo
2	+ - + - -	riĉa, se Amerikano
3	+ - + -	flarilo
4	+ - + - - - - -	muskolo
5	+ - + - - -	sekinbero
6	+ - + - - -	rapidkura besto
7	+ - + - -	ne kompleta aŭdado
8	+ - + - - - -	ofte (mis)pafas
9	+ - + - -	atomnumero 39
10	+ - + - -	sola laŭ sia kvalito
11	+ - + - - - -	speco de tamburo
12	+ - + - - - -	mallongedaŭra
13	+ - + - - - - -	artisma movado
14	+ - + - - - -	pelto de didelfo

### VERTIKALA KLASADO

"Pri lingvoj faras la moŝto profesora  
Dum lian filon logas knabino facilmora  
Kaj malgraŭ diverssenco  
Ne estas diferenco:  
En ambaŭ okazoj  
Estas ... filologo!"



### SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (N° 47)

**KRUCVORTENIGMO** = ĝangalo gast unue nube naŭ glosino tuĉ turment relo alie rea grak tost aplik du efor ĉiun uri miring sole patric ulm se esti zinio oj okaz otid ujo

**SILABENIGMO** = "Kiu semas venton, rikoltas fulmotondron"